A-PDF Merger DEMO : Purchase from www.A-PDF.com to remove the watermark

# STARTO

N-ro 2/2018 (267)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



foto Leonarda Chaloupková

Maja lingva seminario en Skokovy

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto**: cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam. cz

**Libroservo:** Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Dagmar Martinková, Chelčického 51, 568 02 Svitavy, martinkova.sy@seznam.cz, — sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligon al la gazeta retejo

**BANKO-KONTO de ĈEA:**
2800 186 228/2010
**Fio banka Svitavy**

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

**Vicprezidanto:** Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

**Kasisto:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datumbazo, kontado)

**Komitatano:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Esperanto-Muzeo en Svitavy, rilatoj al la urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

**Komitatano:** Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, ĉefredaktoro de la asocia retejo kaj de asociaj retkomunikoj, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kavapech.cz

**UEA-kotizperanto:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle (kontaktojn rigardu en la antaŭa alineo).

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

**Kontrollegis:** la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Polnický, P. Dvořáková

# JUBILEA SOLENAĴO
## 14.-16.9.2018 en Svitavy
okaze de la dekjariĝo
de la Esperanto-Muzeo

**PROGRAMO**

VENDREDE

16:00 Ekfunkcio de la akceptejo en la muzeo, loĝigo, Libroservo, studebloj en la ĈEA-Biblioteko, memstara vespermanĝo

19:00-22:00 Inaŭguro de la nova ekspozicio dediĉita al 10 jaroj de la muzeo kaj 100 jaroj de la respubliko, kun akompana programo kaj refreŝiĝo; projekciado pri la muzeaj aranĝoj; libera babilado

SABATE

9:00-11:45 Solena programo en la Ottendorfer-salonego okaze de la 10-jariĝo de la Esperanto-Muzeo

12:00 Komuna tagmanĝo en la restoracio ASTRA (nedeviga)

13:30 busa forveturo al Moravská Třebová

14:00-17:00 Vizito de la Urba Muzeo kaj renesanca kastelo; propra lunĉo dumvojaĝa rekomendatas (pro pli malfrua vespermanĝo) - por tranoktantoj aliĝintaj ĝis 31.8.2018 senpaga transporto, por la ceteraj 50,- , enirbiletoj 50,-+70,-/resp. 30,-+40,- por studentoj kaj senioroj pro tempoŝparo antaŭpagendas! por nepartoprenantoj de la ekskurso ebleco resti en la muzeo

18:00-19:30 Koncerto de la ensemblo NOPROBLEM Kostelec na Hané (kun repertuaro de Spirituál kvintet) en la Ottendorfer-salonego

20:00 Forveturo de la lastaj trajnoj por la unutagaj partoprenantoj

20:00 Komuna vespermanĝo en saloneto de la restoracio ASTRA (nedeviga), ĉeĥa-slovaka vespero, amuziĝo

DIMANĈE

9:00-11:30 Urbopromeno (proponatas i.a. ekspozicio pri kafo en la Urba Muzeo kaj Galerio, Akvotura arbaro, Parko de patriotoj, stadiono) en la muzeo: Libroservo, studebloj en la ĈEA-Biblioteko, babilado

12:00 Libervola tagmanĝo aŭ trajna forveturo

Paralele 9:00-11:30 kaj ev. 13:30-15:30 Internacia **muzea seminario** (historiaj esploroj, ciferecigado de kolektoj, interŝanĝo de spertoj) laŭinterese aranĝebla ankaŭ vendrede aŭ sabate posttagmeze





**TRANOKTO**

en la nova pensiono U Bárty (www.ubytovanisvitavy.eu) tuj apud la muzeo (komfortaj 2-3litaj ĉambroj kun kuirejeto kaj duŝejo/necesejo memstara aŭ komuna por du ĉambroj; 1-a kaj 2-a etaĝo sen lifto) - 350,- CZK popersone kaj ponokte, sen matenmanĝo; garantiatas nur post aliĝo kaj pago ĝis 31.8.2018

aliajn loĝeblecojn necesas mendi memstare: ekz. Fatima Koclířov (6 km for de Svitavy) - turismaj 2-4litaj ĉambroj kun komunaj duŝejoj/necesejoj) - 207,- CZK popersone kaj ponokte, sen matenmanĝo aparte aĉetebla, aŭ pli komfortaj ĉambroj (nur por personoj kun propra aŭtomobila transporto!) www.cm-fatima.cz

- pliaj eblecoj troveblas en www.hotely.cz/svitavy/

**PROGRAMKOTIZO:** 100,- CZK (por membroj de ĈEA, ĈEJ, SKEF kaj SKEJ), 150,- CZK (por la ceteraj)

**MANĜOJ**

memstaraj, interesitoj pri komuna favorpreza sabata tagmanĝo kaj vespermanĝo en ASTRA (pro tempoŝparo kun elekto el 2-3 manĝoj) devas indiki la elekton en la aliĝilo kaj antaŭpagi

**KONTAKTO:**

Esperanto-Muzeo, nám. Míru 81/1,
CZ-568 02 Svitavy
cea@esperanto.cz
tel. +420 774 928 974 (Libuše Hýblová)

**PLIAJ INFORMOJ, ALIĜOJ KAJ PAGOJ:**

Etaj ŝanĝoj de la programo ev. eblas.
Kompletan aliĝilon kaj pagoinformojn vi trovos en la Kalendaro de aranĝoj en www.esperanto.cz.
Limdato por aliĝoj kaj mendo de servoj estas **31.8.2018,** poste sengarantie!

Ni ĝojatendas vian abundan partoprenon!

# Esperanta opero

La 7-an de aprilo 2018 en Nova Scenejo de Nacia Teatro en Prago okazis premiero de nova opero **Sternenhoch**, komplete prezentita en Esperanto. La operon komponis Ivan Acher, 45-jara poeto kaj muzikisto, kiu jam akompanis per sia muziko ĉirkaŭ 150 teatrajn kaj filmajn verkojn kaj ricevis pluajn honorigojn.

La 29-an de majo 2017 mi ricevis rete lian peton, ke mi esperantigu por la opero kelkajn frazojn. Mi konsentis kaj poste mi ricevadis unuopajn scenojn, kiujn mi tradukadis proze. Mia traduko estis poste muzikigita kaj tiamaniere ĝi fariĝis originalo. La komponisto klarigis, ke li volas, ke la spektantoj aŭskultu melodiojn kaj kantadon, sed ne klopodu deĉifri la vortojn. Tial li deziras tekston en lingvo, kiu similas al la itala, sed ne estas la itala.




*Helga (Vanda Šípová) kaj Sternenhoch (Sergej Kostov) post la prezentado en la vestiblo*

La rakonton **Suferado de princo Sternenhoch** verkis ĉeĥa verkisto kaj filozofo Ladislav Klíma (1868-1928). Sternenhoch estis malbela riĉulo, al kiu monavida oficiro edzinigis sian filinon Helga. Ŝi malamis ne nur la princon, sed ankaŭ ilian bebon, kiun ŝi mortigis. Sternenhoch murdis ŝin, sed duonfreneza li suferas halucinojn, ke ŝi vivas kaj amas lin. Amorinte ŝian kadavron, li veneniĝas kaj mortas.




*Ivan Acher prezentas min al la publiko*

Tiu hororo estas por admirantoj de Klíma preskaŭ kulta verko, tial la teatro estis plenplena. Super la scenejo oni povis legi la tekston ĉeĥe kaj angle, mia traduko kun ĉeĥa versio aperis komplete en broŝura programo.

La voĉoj de la kantistoj estis vere belaj kaj ankaŭ Esperanto sonis impone. Sekvis longa aplaŭdo kaj en la vestiblo malgranda renkontiĝo de spektantoj kun la artistoj. S-ro Acher prezentis ankaŭ min kiel tradukinton. La premieron partoprenis ankaŭ nia vicprezidantino Leonarda Chaloupková, kiu sukcesis elpeti kelkajn fotojn de profesia fotistino.

La opero estas en la normala programo de la Nacia Teatro.

Pliajn detalojn vi trovos en la asocia retejo http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/opera-sternenhoch-v-esperantu-na-scene-narodniho-divadla.html

*Miroslav Malovec*
*fotoj Hana Smejkalová*

# Rejchartice

La Esperanto-klubo Šumperk aranĝis renkontiĝon en Rejchartice la 12-an de majo 2018. Antaŭtagmeze trideko da esperantistoj vizitis Anĝelan herbejon kun 12 anĝeloj kaj lokan preĝejon, kie la sakristiano priskribis la historion de la preĝejo. Alžběta kantis, oni deklamis poemojn kaj fine ni ascendis 60 ŝtupojn de la preĝeja turo.







Postatgmezan programon kun gulaŝo kaj tombolo en loka gastejo riĉigis akordeona muziko de amiko Láďa kaj kukoj bakitaj de niaj klubaninoj.



Kvido



# ĈEJ AKTIVAS 2018/01

(oficiala informilo de ĈEJ redaktata de Václav ZOUZALÍK)

■ Ekde la 27-a de aprilo ĝis la 1-a de majo okazis jam la 5-a Centrejo, ĉifoje en la urbo Žďár nad Sázavou (Ĉeĥio). La programo estis bunta - ekskursoj, diskejoj, kreivaj metiejoj kaj trejnado pri afiŝfarado. Entute ĝin partoprenis 14 partoprenantoj.

■ Kadre de Centrejo okazis sabate je la 28-a de aprilo Ĝenerala Asembleo de ĈEJ. Dum ĝi estis decidite pri ŝovo de oficiala sidejo de ĈEJ el Brno al Prago.

■ Membroj de ĈEJ partoprenis 42-an Internacian Junularan Festivalon en la urbo Marina di Ascea (Italio).

■ Ekde la 14-a ĝis la 17-a de marto 2018 okazis en franca urbo Toulouse trejnado de volontulaj instruistoj de Esperanto. La trejnitoj pritraktis interalie disponeblajn lernolibrojn de Esperanto kaj metodojn de lingvoinstruado laŭ postuloj de Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj. En praktika parto de la trejnado la lernintoj faris fulman kurson de Esperanto en loka rifuĝejo. La trejnado estas subtenita per projekto Erasmus+.

Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe http://mladez.esperanto.cz/

ĈEJ aktivas 2018/01 estas disponebla laŭ permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0. Tutmonde https://creativecommons.org/licenses/by/4.0/deed.eo

Václav Zouzalík

# SKOKOVY


**19 – 22 septembro 2018**

Amika invito al tradicia semajna seminario en Ĉeĥa Paradizo, en familia pensiono Espero en vilaĝeto Skokovy 75 km nordoriente de Prago.

En pura naturo inter homoj sanaj, handikapitaj, junaj kaj maljunaj, kiuj ŝatas Esperanton kaj deziras ĝui naturon. Oni povas ekzerci korpon kaj spiriton, krei mane memoraĵojn kaj ion alian plu… babili, frandi, promeni, ekskursi, diskuti, ludi, eĉ lerni….

Senbara modesta medio, 2-5 litaj ĉambroj, prezo 420 Kč/tago (l Eŭro 26 Kč) por kompleta servo je unu tago. Necesejoj kaj duŝejoj en koridoro. Interreta konekto. Oni pagas surloke.

Kontaktoj: Jindriška Drahotová, Sadová 745/36, 293 01 Mladá Boleslav, Tel: 420 720 652 320
drahotovaesperanto@seznam.cz
drahotova@esperanto.cz
www.sweb.cz/espero.skokovy
www.mlboleslav.cz/esperanto
www.evinatelier.cz
aeh@esperanto-aeh.eu
www.esperanto.cz



## Prelego en Nový Jičín

La 27-an de aprilo 2018 en la urba biblioteko de Nový Jičín **Pavol Kaščák** kaj **Rostislav Čubok** prelegis pri sia vojaĝo al Ĉinio por transpreni la premion en la festivalo de mallongaj filmoj. La inviton al la prelego antaŭtagmeze elsendis eĉ Ĉeĥa Radio Ostrava. Videofilmon pri la prelego vi povas vidi ĉi tie:
https://polar.cz/zpravy/novojicinsko/novy-jicin/11000012674/film-esperantistu-z-novojicinska-slavil-v-cine-uspech

## Esperanto en Praga preĝejo

En la preĝejo de Sankta Pankracio la 28-an de februaro 2018 **Max Kašparů** celebris sanktan meson en Esperanto. Ĉeestis ne nur katolikoj, el nia asocia komitato Leonarda Chaloupková kaj Miroslav Hruška. La katolika eklezio akceptis Esperanton kiel liturgian lingvon. Daniel Mrázek verkis artikolon por la portalo *Náboženský infoservis* (Religia Infoservo). La meso estis dediĉita al nia karmemora Miroslav Smyčka, esperantlingve kantis lia filino **Jolana Haan Smyčková** kaj ŝia edzo **Richard Haan,** akompanate de orgenisto **Jiří Jan Nepomuk Svoboda.** Detalojn vidu en la asocia retejo.



*fotis Petr Chrdle*

## Legaĵo IV




Nun estas aĉetebla libro LEGAĴOJ IV. Ĝi enhavas 100 paĝojn de bunta enhavo de seriozaj artikoloj, de konataj esperantistoj, tradukoj de ĉeĥlingvaj aŭtoroj, fabeloj, skeĉoj, originalaj verkoj en Esperanto de eksterlandaj samideanoj kaj aliaj. Ankaŭ la LEGAĴOJ III. kaj IV. estas aĉeteblaj po 50 Kč, poŝtpago 20 Kč.

Jindřiška Drahotová
drahotovaesperanto@seznam.cz
telefono 720652320

## Sukcesa kurso en Mladá Boleslav

Dum tri monatoj – februaro, marto kaj aprilo 2018 diligente studis naŭ homoj, freŝaj pensiuloj en Urba Biblioteko de Mladá Boleslav (du viroj kaj sep virinoj). Ili petis daŭrigon de la studado aŭtune kaj la direktorino de la biblioteko promesis denove disponigon de projekciilo kaj komputilo en salono en la dua etaĝo.

Dum somero la gaja kolektivo kunvenos en urba ĝardeno ĉe universitato de la tria aĝo „Klementinka“, de junio ĉiun merkredon je la 10-a horo, kie povas nin viziti kiu ajn.

Iuj jam deziras korespondi per facila simpla lingvo rete aŭ letere. Ĉu vi povas skribi al ili? Ni sendus adresojn.

Instruisto: Jindřiška Drahotová
Rondeto de doktoro Hradil,
Mladá Boleslav
drahotovaesperanto@seznam.cz
blanka.huzerova@post.cz

# PRI ESPERANTA MOVADO EN REGIONO NÁCHOD

Komence de aprilo tiu ĉi jare organizis sinjoro Bc. Richard Švanda, laboranto de Urba muzeo Náchod, NEESPERANTISTO, vere interesan interdiskuton: por ĉirkaŭ 15 personoj li rakontis pri historio de esperanta movado en sia regiono. - La kunveno okazis en ĉarma, hela saloneto de hotelo "Ĉe Ŝafido".



Sinjoro Švanda ankaŭ helpe de komputilo informis pri komenco de ideoj pri internacia lingvo, li parolis pri Zamenhof kaj aŭdigis lian esperantan parolon dum la unua E kongreso en Bulonjo sur Maro (mi tradukis, iomete eksicitinta, en la ĉehan), poste li konatigis la aŭskultantojn pri la lingvo mem.

El historio de la E-movado li informis: Jam en la jaro 1907 en Náchod estis fondita unua esperanta klubo de sinjorino **Běla Reichlová** (1871−1951) kaj ŝia edzo Hynek. La klubo organizis multajn esperantajn aranĝojn, kursojn kun multaj anoj ktp. Kunvernadis ĉeĥaj kun germanaj esperantistoj en granda nombro. Eble la plej konataj personoj de la E klubo estas **Julie Šupichová** (1884−1970), posta verkistino, aŭtorino de E lernolibroj, honora ano de UEA, dr. **Stanislav Schulhof** (1864−1919), aŭtoro de multaj artikoloj por gazetoj kaj poeto (sed li estis aktiva ĉefe en Pardubice, kie li vivis) kaj posta generalo **Bohuslav Všetička** (1893−1942), ano de legioj kaj ĉefa gvidanto de kontraŭnazia organizo "Defendo de Nacio".




Ĉirkaŭ 1920-aj jaroj ĝis la jaro (eble) 1933 funkciis en vagonara stacidomo Starkoč (proksime de Náchod) restoracio ESPERANTO, kie iu sinjoro **Prokop** organizis kunvenojn de esperantistoj. Li eĉ eldonis bildkarton, kiu prezentas la restoracion kun rimarko, ke ĉi tie oni parolas esperante.




Por kelka tempo funkciis ankaŭ Esperanta oficejo en Náchod.

"Nuntempe, bedaŭrinde, jam ne plu eble en la regiono estas iu aktiva esperantisto" ... finis sian raporton sinjoro Švanda.

Mi esprimas grandan dankon al sinjoro Švanda por lia interdiskuto!

LChal

# La 9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE)

**11. - 17. 2. 2018**

Kubo denove malfermis la pordojn al esperantistoj kaj okazigis la 9-an Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto en Havano. Al la aranĝo aliĝis 240 partoprenantoj el 20 landoj inter kiuj krom latinamerikanoj, usonanoj kaj kanadanoj ĉeestis pluraj eŭropanoj kaj gesamideanoj el Japanio kaj Koreio.




La kongreso disvolviĝis en la hotelo Panamerikano en la orienta parto de Havano. Je dispono estis naĝejo, kie okazis interkona kaj internacia vesperoj, Esperanto-kabaredo kaj la adiaŭa festo.

La kongresa temo "Lingvoj kaj kulturoj: edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj" celas alproksimiĝon, edukadon kaj konduton de la homoj por favora agado, kiu estu utila por la planedo kaj por la estonteco de la homaro. La temon enkondukis kaj reĝisoris la prezidantino de la Kuba E-Asocio Maritza Gutiérres Gonzáles. Ŝi ankaŭ prezentis kaj donis informojn pri sia lando kaj pri la elsendoj en Radio Havano Kubo. Juan Ramón Rodrigues Gómes resumis la TAKE-kongresojn ĝis nun okazintaj.

La solena inaŭguro okazis en la teatro de la Nacia Belarta Muzeo kun la ĉeesto de la vicministro de la kulturo Fernando Rojas kaj aliaj eminentaj gastoj. Tuj poste komenciĝis diversaj programeroj, kiuj daŭris la tutan semajnon.

La programo estis vere riĉ-enhava. Krom pri la kongresa temo okazis diversaj prelegoj kaj prezentoj, konversaciaj rondoj, forumoj, kant-, danc- kaj instruatelieroj, libroprezentoj, origamio, tabloludoj, kvizoj, ILEI-kunsido, literatura rondo, aŭkcio. Oni parolis pri ĝemelaj urboj, pri radioamatoroj, pri tradicia kuba vestaĵo *Guayabera*, pri *Yumeiho* terapio kun praktika elmontro. Ni eksciis pri la kuba folklora muziko, pri historio de Esperanto en Santiago de Kubo, pri la kultura projekto de la kantgrupo Amindaj kaj ilia premio ricevita en la Internacia Festivalo de Filmetoj "Teo kaj Amo" kaj estis prezentita la lasta dokumentfilmo "Lekantoj el kristalo", kiu rakontas vivon en la montaro. Okazis forumo pri konsciigo kaj kapabligo, UEA kaj ILEI ekzamenoj. Enkondukan prezenton por AMO-Seminario prezentis Sara Spanó, la estraranino de UEA. Francesco Maurelli informis pri la Tutmonda E-Junulara Organizo (TEJO), kies prezidanto li estas.

Oni parolis pri Zamenhof-jaro kaj pri Esperanto en la interreta mondo. Interesuloj eksciis kiel labori teame pri konfliktoj kaj solvadoj, ni akiris sciojn pri la plej gravaj aspektoj de la internacia E-movado, pri ĝiaj strukturo, historio kaj kulturo.

La 9-a TAKE donis al multaj Kubanoj, kiuj ne ofte povas vojaĝi eksterlanden eblecon konatiĝi, amikiĝi kun alilandanoj.

*Liba Gabalda*

# SOLENAĴO OMAĜE AL F. V. LORENC

**dimanĉe la 8-an de julio 2018**



La aranĝo omaĝe al la poligloto kaj la aŭtoro de la 1-a Esperanto-lernolibro por ĉeĥoj Francisko Valdomiro Lorenz en la urbo **Čáslav** kaj en la vilaĝoj **Vrdy** kaj **Zbyslav** (la naskiĝloko).

**SKIZA PROGRAMO:**

**10:30** Renkontiĝo antaŭ la trajna stacidomo en Čáslav

**10:30-13:15** Trarigardo de la historia urbocentro, komuna tagmanĝo (pro tempoŝparo kun unueca manĝo - antaŭmendo ĝis 4.7. necesas!)

**13:15** transporto al la komunumo Vrdy - per aŭtoj aŭ komunuma buso

**14:00** Solena ceremonio en la komunumo Vrdy (6 km oriente de Čáslav) okaze de senvualigo de la memorplakedo de F. V. Lorenz far Z. Myslivec sur la konstruaĵo de la komunuma biblioteko kaj alpreno de ĝia nomo laŭ li - kun akompana kleriga kaj kultura programo kaj inaŭguro de la ekspozicia panelo pri Lorenz. La aranĝon partoprenos i.a. konsulino de Ĉeĥio en Brazilo s-ino Pavla Havrlíková. Vizito de la apuda vilaĝo Zbyslav, la naskiĝloko de Lorenz, promeno al la naskiĝdomo, preĝejo kaj lia unua lernejo.

**Reveturo al Čáslav por trajnoj je 16:50 kaj/aŭ 17:50**.

Bv. sekvi pliajn detalojn en la Kalendaro de aranĝoj en Esperanto.cz .

**Kontaktoj:**

pavla.esperanto@gmail.com
chrdle@kava-pech.cz

# LA 22-A EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO

**6.-13. 8. 2018**
**EN PODĚBRADY**



En la kongreso bonvenas ĉiuj esperantistoj, kiuj volas ĝui kristanan medio.

Loĝado en Agrikultura mezlernejo, Boučkova 365 en 2-litaj ĉambroj kun propra duŝo-/necesejo. Manĝoj kaj programoj okazas samloke.

Krom ekumena diservo, regulaj preĝoj kaj sanktaj mesoj atendas vin urbotrarigardo, tuttagaj ekskursoj al Kutná Hora aŭ al kastelo Chlumec n. C. kaj ĉevalbredejo en Kladruby, duontagaj ekskursoj, prelegoj, koncertoj, kantado.

**Koncerto sabate 11. 8. de 16-a horo en evangelika preĝejo: Kantos Jolana Haan Smyčková kaj Richard Haan.**

Aliĝkotizo por ĈEA-membroj 30 Eŭroj, kongreskotizo 150 Eŭroj (en 2-lita ĉambro) aŭ 200 Eŭroj (en 1-lita ĉambro).

Aliĝilo elŝuteblas en
http://www.ikue.org/cz/
http://keli.chez.com/

**Kontakto:**
Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady
tel.: +420 723 672 335
retadreso: polnickypavel@seznam.cz

**Ni sincere invitas Vin partopreni**

# Feston okaze de 85 jaroj de Esperanto-klubo en Svitavy

**de la 4-a ĝis la 6-a de aŭgusto 2018**

**Programo:**

**Sabato:**

ekde 10-a horo: Alveno de partoprenantoj - registrado en Esperanto-Muzeo de Svitavy – loĝigo

19:00 h: Interkona vespero en Esperanto-Muzeo - **rekta elsendo de Verda Stacio en youtube kaj facebook**

**Dimanĉo:**

9:00 h: solena malfermo en Esperanto-Muzeo Svitavy, salutoj

9:30 h: prezentado pri historio de la klubo

10:30 h: premidona ceremonio - transdono de diplomo de Teo kaj Amo al la urbestro Mgr. David Šimek kaj transdono de la libro „Rakonto pri Teo"

10:45 h: Dekorado per diplomo de Honora membro de la klubo

11:00 h: Premiero de mallonga filmo – Ŝlosiloj

11:15 h: Ceremonio de teo

*12:30 h: Tagmanĝo en restoracio Astra*

14:15 h: Trarigardo de la urbo Svitavy kaj de la Urba muzeo kaj galerio, por interesiĝantoj promeno al la fonto de la rivero Svitava ( ĉirkaŭ 6 kilometroj)

*18:00 h: Vespermanĝo en restoracio Astra*

19:30 h: Koncerto de Anjo Amika **(rekta elsendo de Verda Stacio en youtube kaj facebook)**

**Lundo:**

Tuttaga ekskurso: forveturo de la muzeo: 9:00 h

11:00 h: Vizito de terfaŭko Macocha, trarigardo de la groto kaj ŝipveturado sur la subtera rivero Punkva /180,- CZK/

*13:00 h: Tagmanĝo*

16:00 h: Alveno al kastelo Bartošovice kaj loĝigo **de la partoprenontoj de la 5-a Esperanto-lernejo** aŭ reveno al Svitavy por ceteraj partoprenantoj

# La 5-a Internacia Esperanto-lernejo en kastelo Bartošovice

**de la 7-a ĝis la 9-a de aŭgusto 2018**

**Mardo:**

*8:00h: matenmanĝo*

9:00h: kursoj de Esperanto - niveloj A,B,C

*13.00h: tagmanĝo*

14:00h: ekskurso al la Natura parko Poodří

*18:00h: vespermanĝo*

19:00h: koncerto en Esperanto

**Merkredo:**

*8:00h: matenmanĝo*

9:00h: kursoj de Esperanto

*13:00h: tagmanĝo*

16:00h: **rekta elsendo de Verda Stacio en youtube kaj facebook**

18:30h: Vernisaĵo de ekspozicio pri Teo kaj Amo - la urba biblioteko de Nový Jičín

**Ĵaŭdo:**

*8:00h: matenmanĝo*

9:00h: kursoj de Esperanto

*13:00h: tagmanĝo*

14:00h: Fino de la lernejo

**Aliĝoj Svitavy:**
dvor.libuse@seznam.cz
**Aliĝoj Bartošovice:**
verdastacio@gmail.com

# Muzea nokto en Svitavy

ĉifoje revenis al la jaro 1968 sub reĝio de Radka Oblouková. En la muzeo hantis fantomo Kuli kaj petolis fabeloj.



foto Pavel Dvořák

Venis ankaŭ registara delegitaro, gravuloj de la urbo, skoltoj, pioniroj, eĉ „hippies“. Marie Minářová salutis la ĉeestantojn en la nomo de la tiama klubestro Linhart Rýznar.



foto František Minář

Junaj teatristoj kantis kantojn de Marta Kubišová.

Jan Richtr projekciis por la infanoj fabelojn de reĝisoro Karel Zeman filmitajn en 1968.

Kvankam en la urbo estis cirko kun disvenditaj biletoj kaj en la muzea ĝardeno estis plenplene da kafumantoj, ankaŭ nian muzean nokton partoprenis pli ol 300 vizitantoj, tial la programo estis dufoje ripetita, je la 20-a kaj 22-a horo.



foto Pavel Dvořák



foto Jan Richtr

Ján Bobrík prezentis kolonelon de garnizono Květná kaj Dagmar Martínková rolis kiel Alena Udržalová, estrino de skolta grupo.

*Libuše Dvořáková*

# 35-a datreveno de Esperanto-klubo en Benešov

En la klubejo de Societo de Senioroj en Benešov la 19-an de majo okazis solenaĵo. Ni festis 35-jaran datrevenon de Esperanto-klubo.



Kunvenis ĉirkaŭ 25 personoj, unu sinjorino, iama kursistino, eĉ el Pollando.



Ni bone amuziĝis. Krom kantado kaj raporto pri la klubo kaj pri aliaj E-kluboj ni, klubanoj el Benešov, esprimis nian sinceran dankon al nia longjara gvidanto, sinjoro Václav Stibůrek, por lia oferema, fidebla gvidado de la klubo.



Posttagmeze ni per urba vagonareto vizitis belan, vidindan kastelon Konopiště (kelkaj homoj restis ekstere - en parko, en kafejo) kaj ĉirkaŭ la 4-a ni revenis denove per vagonareto en la urbon.



Ankoraŭ ian tempon ni travivis en la klubejo ĉe agrabla, amika babilado.



Dankon al vizitantoj kaj lertaj organizantoj pro la sukcesa aranĝo.

LChal

# BENEŠOV
# la urbo de nia konferenco

Benešov ĉe Prago (vagonare ĉirkaŭ 50 kilometrojn de Prago) estas la urbo de nia oktobra Esperanto-konferenco.

De historio ni scias, ke jam en la 11-a jarcento, dum regado de dinastio de Přemysl, okazis koloniado de teritorio sude de Prago. Skriba mencio pri Benešov devenas de la jaro 1219.

Komence la homoj rezidis sur teritorio, nuntempe nomata NA KARLOVĚ. Estis tie feŭdobieno, preĝejo, vilaĝeto.

Poste la centro translokiĝis al nuntempa placo.

Sur la monteto Karlov tiam oni fondis monaĥejon de minoritoj. Pli poste tiun monaĥejon ekposedis praga episkopo TOBIÁŠ de BENEŠOV. Tiu ĉi homo igis konstrui por si ankoraŭ pluan rezidejon – kastelon KONOPIŠTĚ.



Konopiště (el Vikipedio)

Post formorto de la gento BENEŠOVICI ekhavis la kastelon la gento de ŠTERNBERK. Ora stelo sur blua kampo estis ilia emblemo, ĝin transprenis la urbo Benešov.

1420 – armeestro Jan Žižka kun siaj batalantoj, survoje Pragon, forbruligis la monaĥejon Karlov. Sed, feliĉe, ĝi ne estis detruita komplete.

La urbo mem fariĝis grava dum regado de reĝo JIŘÍ Z PODĚBRAD. En la jaro 1451 okazis en Benešov kunsido de ĉeĥaj nobeloj, kies celo estis repacigi la katolikan Eŭropon kun Ĉeĥa reĝolando.

1473 – reĝino-vidvino JOHANKA en preskaŭ ruinigita monaĥejo alparolis ĉeĥajn nobelojn: dum 3 horoj ŝi instigis ilin, ke ili estu konkordaj kaj laborantaj por bonfarto kaj gloro de la patrujo.

Grava frapo por la urbo estis okupo (1648) de sveda armeo dum la 30-jara milito (1618-1648). La urbo multjare ne kapablis reviviĝi.

1703 – oni fondis kolegion de piaristoj kun baza lernejo kaj gimnazio.

1802 – la urbo elaĉetis sin de servuteco kaj de tiu tempo, la urbo tute ĉeĥa, ekestis loko de patriotismaj aktivuloj.

1871 – konstruo de fervojo tra urbo. Ĝi estis ligilo inter Prago kaj České Budějovice.

21.12.1918 – festa bonvenigo de la unua ĉeĥoslovaka prezidento T. G. Masaryk, kiu tra la urbo revenis de ekzilo en sian patrujon per speciala vagonaro.

Granda tragedio por la urbo venis dum la 2-a mondmilito. La germanaj okupantoj planis ekeston de SS-Stadt Bohmen, kaj tial ili devigis multajn civitanoj transloĝiĝi. Krome ekestis, preskaŭ en la urbo, granda ekzerca teritorio por germana armeo. Multegaj homoj devis forlasi siajn hejmojn.

BENEŠOV hodiaŭ estas bela, moderna urbo kun proksimume 17 000 loĝantoj. Oni povas trovi ĉi tie diversajn vidindaĵojn – preĝejon de sankta Anna, monumentajn arkojn de ruinigita monaĥejo de minoritoj, malnovan hebrean tombejon, bierfarejon FERDINAND, domon de fa-

ma ĉeha violonisto, komponisto JOSEF SUK, Muzeon de arto kaj filion de Muzeo de SUB-BLANÍK-regiono (pobočka Muzea Podblanicka), subterajn koridorojn … lernejetojn kaj lernejojn.

En la Supera Faka Lernejo kaj Mezlernejo Agrikultura, strato Mendelova 131, okazos nia aŭtuna E-konferenco. La lernejo situas proksimume 300 metrojn de la stacidomo (niaj deĵorantoj atendos vin tie de la 15-a ĝis la 18-a horo).



Stacidomo de Benešov (el Vikipedio)

Proksime de la urbo (ĉirkaŭ 2 km) troviĝas la kastelo KONOPIŠTĚ, hodiaŭ konata antaŭ ĉio kiel ĉefa kaj lasta rezidejo de aŭstria-hungara ĉefduko FRANZ FERDINAND de AŬSTRIO-ESTE kaj lia ĉeĥa edzino ŽOFIE CHOTKOVÁ. Vivoprenanta atenco kontraŭ li, la 28-an de junio 1914 en Sarajevo, estis preteksto por eksplodo de la 1-a mondmilito, la 28-an de julio 1914.

La kastelo KONOPIŠTĚ kun bela, vasta parko estas nun protektata kiel Nacia Kultura Memoraĵo de Ĉeĥa Respubliko.

Venu por partopreni la konferencon kaj ĝui agrablan medion de Esperanto-geamikoj. Venu, ni antaŭĝojas vidi vin!

Lchal

# P O Z V Á N K A

NA ČLENSKOU SCHŮZI ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU, z.s. (ČES),
která se koná v přednáškovém sále Vyšší odborné školy a Střední zemědělské školy
BENEŠOV, Mendelova 131
**dne 13.10.2018 od 9 hodin.**



**Program:**
1. Zahájení, přivítání hostů, prezentace, kontrola usnášeníschopnosti, volba orgánů členské schůze (3-5členného předsednictva, zapisovatele a ověřovatelů zápisu)
2. Zpráva o hospodaření ČES
3. Zpráva o činnosti ČES a jejích organizačních složek
4. Volba volební komise pro volby do výboru ČES pro rok 2019
5. Diskuze ke zprávám o hospodaření a činnosti ČES
6. Různé
7. Usnesení
8. Závěr

V Bohutíně dne 1.5.2018

Mgr. Libuše Hýblová,
předsedkyně ČES, z.s..

# Přihláška na konferenci ČES (Benešov 12.-14.10.2018)

Přihlášku vyplňte a zašlete e-mailem na adresu vratislav.hirs@esperanto.cz nebo poštou na adresu pokladníka Ing. Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Ruprechtov nebo úplně nejlépe - vyplňte elektronický formulář na adrese http://esperanto.cz/aligxilo2018

**Doporučení:** Po vyplňovacích polích se pohybujte klávesou TAB. Tak žádné políčko nepřehlédnete.

**jméno a příjmení účastníka** (příp. včetně titulů - tak bude na jmenovce účastníka)

adresa:

ulice

PSČ a místo

e-mail telefon

**variabilní symbol platby** – číslo průkazu člena ČES, popř. ČEJ či SKEF (pro ověření nárokovaného zvýhodnění), nečlenové napište 5 číslic, kde první **NE**bude „0“

Číslo OP nebo pasu vyplní každý ubytovaný účastník

**Označení u čtverečků křížkem (nastavíte/zrušíte mezerníkem) znamená výběr. Zakroužkování (při ručním vyplňování) okolo čtverečku ruší (chybný) výběr.**

**Přihlašuji se na akci Českého esperantského svazu v Benešově, objednávám a zavazuji se uhradit následující.** (Přihláška je platná až po zaplacení.)

| | | |
|---|---|---|
| Základní účastnický poplatek | 350 Kč | ☐ |
| Zvýhodněný účastnický poplatek **pro členy ČES, ČEJ, SKEF přihlášené po 15.9.2018** | 250 Kč | ☐ |
| Zvýhodněný účastnický poplatek **pro členy ČES, ČEJ, SKEF kteří se přihlásili a zaplatili nejpozději 15.9.2018** | 150 Kč | ☐ |
| Čestný člen ČES, nevidomý člen ČES včetně doprovodu, člen výboru ČES, místní organizátor, správce Libroserva | 0 Kč | ☐ |
| Jako mládežník do 26 let uplatňuji slevu 50 % z účastnického poplatku (nárok na slevu prokáži při prezenci) | 50 % | ☐ |

Adresa ubytování : Vyšší odborná škola a Střední zemědělská škola, Mendelova 131, 256 01 Benešov, 700 m od nádraží: https://mapy.cz/s/2H031 Jídelna a sál tamtéž. Vše v přízemí.

Nástup je možný od 16:00 v pátek. Pokoje 2, 3 a 4 lůžka se spol. koupelnou a WC na chodbě. Kapacita 70 lůžek. K dispozici je kuchyňka s rychlovarnou konvicí, s vařičem, chladničkou a mikrovlnkou, ALE bez nádobí. Pro případ většího zájmu je zajištěno ještě 24 lůžek ve stavebním učilišti, cca 800 m vzdáleném, v 1. a 2 patře bez výtahu. Nebude zajištěno druhé (=vegetariánské menu). Výdej oběda 12:00 – 13:00. Vyklizení pokojů v neděli do 13:00.

Objednávám **zvýhodněný kompletní balíček**:

| | | |
|---|---|---|
| 2 noclehy v (max.) 3-4-lůžkovém pokoji a stravování od páteční večeře do nedělního oběda | 1000 Kč | ☐ |
| 2 noclehy v (max.) 3-4-lůžkovém pokoji a stravování od páteční večeře do nedělní snídaně + balíček místo nedělního oběda | 1000 Kč | ☐ |
| 2 noclehy a stravování od páteční večeře do nedělního oběda (pouze pro členy výboru a výborem určené pomocníky) | 360 Kč | ☐ |
| pouze stravování od páteční večeře do nedělního oběda (pouze pro členy výboru a výborem určené pomocníky) | 360 Kč | ☐ |

Objednávám **jen jednotlivé ubytovací a stravovací služby**:
Pozn.: Rozhodně nevyplňujte, pokud již máte objednaný zvýhodněný kompletní balíček.

| | | |
|---|---|---|
| večeře – pátek | 70 Kč | ☐ |
| nocleh z pátku na sobotu na společném pokoji | 320 Kč | ☐ |
| | | |
| snídaně - sobota | 30 Kč | ☐ |
| oběd - sobota | 90 Kč | ☐ |
| večeře - sobota | 70 Kč | ☐ |
| nocleh ze soboty na neděli na společném pokoji | 320 Kč | ☐ |
| | | |
| snídaně - neděle | 30 Kč | ☐ |
| oběd - neděle | 90 Kč | ☐ |

prosím ubytovat s: (vepište jméno osoby – platí, jen pokud je požadavek vzájemný)

Nebude-li spolubydlící uveden, rozdělíme přihlášené do pokojů dle pohlaví a věku!

| | | |
|---|---|---|
| členský příspěvek ČES na rok 2019 | | Kč |
| případný dobrovolný příspěvek pro ČES | | Kč |
| příplatek za přihlášku a/či platbu po 30.9.2018 | 100 Kč | ☐ |
| za platbu na místě (Přihlášky na místě jsou však bez záruky!) | 100 Kč | ☐ |

Upřesnění pro případ společné platby:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Za mne platí | | částku viz „Zaplatím tedy celkem" níže | | |
| Já platím za | | ještě i částku | | Kč |

## Zaplatím tedy celkem .......................... Kč

**Úhradu proveďte na účet ČES:**

Fio banka, číslo účtu **2800186228** / **2010**

Jako **variabilní symbol** uveďte číslo svého průkazu člena či čísla, které jste na vyhrazené místo pro číslo průkazu člena (jako nečlen - právě jen pro tento účel) uvedl(a)!

(kontrolu či přepočet provede pokladník ČES, který přihlášku také obratem potvrdí - jedině však - na uvedenou emailovou adresu)

V případě odhlášení se se účastnický poplatek nevrací! Odhlášení po 30.9.2018 budeme řešit individuálně a poplatky zahrnou i již nezrušitelné služby.


V ______ dne ____.2018 ..............................................

podpis (pro přihlášky poštou)

# Grava verko de Hus en Esperanto

Kiel jubilea 200a eldonaĵo de mia eldonejo KAVA-PECH ĵus aperis elektitaj ĉapitroj de la plej grava verko de Jan Hus *Pri la eklezio*. El la ampleksa latina verko la kernajn ĉapitrojn elektis kaj esperantigis Gerrit Berveling.

Kiel konate, la vivo kaj agado de la fama ĉeĥa teologo kaj antaŭlutera reformisto Jan Hus estas ligita al la praga universitato, kie li estis kelkajn jarojn eĉ rektoro, kaj al la Betleĥema kapelo, en kiu li predikis. En siaj predikoj kaj verkoj li forte kontraŭstaris la nekristanan konduton de ekleziularo, precipe la indulgencojn, kaj eĉ rekte atakis la papon. Tio ĉio respeguliĝas ankaŭ en lia ĉefverko *Pri la eklezio*.




Jan Hus venis al la koncilio en Konstancon por defendi sian instruon, sed al li ne estis permesite alparoli la koncilion. Male, ĉar li ne volis revoki sian instruon, li estis la 6-an de julio 1415 mortbruligita.

Taŭgas aldoni la nunan sintenon de la katolika eklezio al Jan Hus. La temon ekvivigis komence de la 1960-aj jaroj kardinalo Jozefo Beran ene de la 2-a Vatikana koncilio. En 1996 kardinalo Miloslav Vlk vortigis sian opinion, ke oni devas revoki la verdikton kontraŭ Hus.

Papo Johano Paŭlo la 2-a en Prago jam aprile 1990 estis deklarinta interalie, ke la personeco de Jan Hus devus hodiaŭ kristanojn pli kunigi ol disigi, kaj en decembro 1999 en sia parolo al la partoprenantoj de la Internacia Simpozio pri Majstro Jan Hus en Romo li deklaris: *Mi sentas profundan kompaton pro la kruela morto, al kiu Jan Hus estis kondamnita*; kaj li ripetis sian esperon diritan jam en Prago 1990, nome ke nun la personeco kaj instruoj de Hus devus kristanojn kunigi.

Tio estas ankaŭ la kialo, ke mi decidiĝis eldoni la tradukon de elektitaj ĉefaj ĉapitroj de lia ĉefverko ĉijare, okaze de la ekumena kongreso en Poděbrady. La prezo de la bele bindita 87-paĝa libro estas 187 Kč, sed por la membroj de ĈEA validas rabatita prezo 100 Kč.

Petro Chrdle
chrdle@kava-pech.cz

# Věra Ludíková jubileas



Poetino, verkistino, amikino de Esperanto, la 16-an de junio festas sian 75-jariĝon. Ŝi naskiĝis en Ústí nad Orlicí, vivas en Prago. Ŝi eldonis ĉirkaŭ 25 librojn kun poezio kaj poetisma prozo. Inter ili troviĝas ankaŭ libroj aŭ tekstoj en Esperanto (kunlabore kun Jaroslav Mráz, Miroslav Malovec, Jiří Patera) aŭ mencioj pri Esperanto. Ŝiaj verkoj havas spiritan karakteron, temojn pri la antikvaj civilizacioj, dua mondmilito kaj nuntempa vivo. KE Brno prizorgas [ŝian retejon] kun pluraj verkoj.

# VICE pri Esperanto

VICE estas prestiĝa internacia gazeto kaj reta portalo, funkcianta ankaŭ en Ĉeĥio. En la maja numero 2018 aperis longa artikolo ***Esperanto není mrtvý jazyk*** (Esperanto ne estas morta lingvo) de redaktoro Ivo Mikšovský kunlabore kun Pavla Dvořáková, Miroslav Malovec kaj Vladimír Türk, kiuj estas tie intervjuataj. https://www.vice.com/cs/article/7xmk5b/esperanto-neni-mrtvy-jazyk

La redaktoro mencias unue la novan operon Sternenhoch, memorigas famajn verkojn, en kiuj aperis Esperanto, nome *Diktatoro* de Chaplin (1940), kie estas vendejo kun esperantlingvaj surskriboj, filmon Incubus (1966) kun dialogoj en Esperanto kaj operon *Najado* de A. Dvořák en traduko de T. Pumpr. Sekvas intervjuoj kaj fotoj el diversaj E-aranĝoj.

*-mm-*

# EPOCHA pri Esperanto

La portalo EpochaPlus publikigis (23.5.2018) artikolon de redaktoro Pavel Beneš ***Umělý jazyk esperanto: Lingvistická perla, která hýbe světem*** (Artefarita lingvo Esperanto: Lingvistika perlo, kiu agitas la mondon). https://epochaplus.cz/umely-jazyk-esperanto-lingvisticka-perla-ktera-hybe-svetem/

La aŭtoro skribas pri L. L. Zamenhof, L. N. Tolstoj, J. Verne, J. R. R.Tolkien, kiuj la ideon subtenis, sed ankaŭ pri Hitler kaj Stalin, kiuj ĝin persekutis, kaj finas per UNESCO kaj fondiĝo de ĈEA.

# La Esperanta Librejo de Eduka Servo




En la interneto ĉiam aperas novaj retejoj, kiuj proponas klasikaĵojn de Esperanta literaturo por senpaga elŝuto. Tre bele prilaboritajn verkojn vi trovos ĉe http://eduinf.waw.pl/esp/lern/librejo/index.php

Estas tie famaj aŭtoroj (Andersen, Auld, Burroughs, Dickens, Efremov, Ezop, Grimm, Howard, Lao She, Lem, Mickiewicz, Orzeszkowa, Piron, Prus, Sienkiewicz, Turgenev, Verne, Wells, Zamenhof), ne mankas ankaŭ Biblio.

*-mm-*

# UEA ELEKTIĜIS EN GVIDAN NEREGISTARAN GRUPON ĈE UNUIĜINTAJ NACIOJ

Rezulte de diplomatiaj elpaŝoj en Novjorko kaj Ĝenevo, UEA elektiĝis por trijara periodo en la estraron de internacia kunordiga grupo de neregistaraj organizoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, konata per la mallongigo CoNGO (prononcu "kongo")

Pli formale "La Konferenco de NRO-oj en Konsultaj Rilatoj kun UN", CoNGO funkcias kiel tegmenta asocio por pli ol 500 organizoj kiuj tenas konsultajn rilatojn kun ECOSOC, la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj. La celo de CoNGO estas faciligi la partoprenon de NROj en la UN-sistemo kaj kunlabori kun UN por komunaj celoj, ekzemple la Celoj por Daŭripova Evoluigo.

UEA jam delonge estas membro de CoNGO kaj partoprenas en ties kunvenoj kaj laborgrupoj. Lastatempe ĝi aparte aktivas en komitato pri paco (Vieno) kaj pri edukado (Novjorko).

*Gazetaraj komunikoj de UEA, n-ro 736*

# Bakalaŭra edukado de Esperanto

Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) anoncis, ke la **ĉina eduka ministerio akceptis Esperanton kiel bakalaŭran edukadon**, post kiam IKEF konvinkis la edukan ministron, ke ekzistas merkata bezono, kvankam negranda, de esperantigitaj studentoj. La edukado daŭros 4 jarojn. Fakte jam 11 diplomitoj sukcese finis la studon ĉe ĉina universitato, sed ĝi servis nur por Ĉina Internacia Radio. Nun ĝi servos por la tuta socio. Se ĝi sukcesos, ĝi povos inspiri universitatojn en aliaj landoj.

**ĈARMA RESTADO EN SKOKOVY** dum la 47-a lingva Esperanto-seminario. En la tagoj de 2-a ĝis 6-a majo okazis kunveno de kelkaj same agorditaj, simpatiaj homoj. Ili travivis komunan tempon ĉe lingvostudado, ekskursoj en belan naturon ĉe bela vetero, ĉe interesa vespera programo ktp. Venis eĉ 2 fremdlandanoj - Polino Jadwiga kun sia sveda amiko kaj 2 junaj viroj, esperantaj komencantoj. Ni deziras al ili sukcesojn en la studado de la lingvo!

Mi nome de ĉiuj partoprenatoj tre dankas precipe al organizantino de la seminario - Jindřiška Drahotová. Nian dankon meritas ankaŭ lektorinoj Margit Turková kaj Libuše Filipová.



Lastan vesperon ni rigardis malgrandan spektaklon de kurso de komencantoj kaj poste de kurso de progresintoj. Dum tiu ĉi dua prezentado venis eĉ "poeto" kun kortuŝa poemo, Karkonoŝulo, vagabondo, mondvojaĝantino, printempa feino kaj aliaj figuroj. Ni ĉiuj bone amuziĝis.

LChal

# Spegula eldono de Malnovaj grekaj mitoj senpage

Kiam mi unuan fojon ekvidis la esperantigitajn Malnovajn grekajn mitojn de Eduard Petiška, mi tuj ekkomprenis, ke ĝia dulingva spegulforma realigo, eĉ kun eblo aŭskulti ilin **modele legitajn** fare de Jarka Malá, Jan Fidel Řepa kaj Vladimír Türk, estas ege valora. Kaj pli, ke ĝi estas taŭga ankaŭ didaktike, do estus tre bone, se mi farus al ĝi ligilon de la multmedia paĝo origine farita por studentoj laŭ la lernolibro *Esperanto od A do Z*, kiu estas tamen senpage uzebla por iu ajn, kiu volas ripeti siajn konojn de Esperanto:
http://kava-pech.cz/procvicujsiesperanto

Kiel profesia eldonisto mi tamen ne povas fari ligilon al io, kio ne estas pura koncerne al aŭtoraj rajtoj, tial mi promesis strebi prizorgi la permeson de la heredantoj post Eduard Petiška. Ununura parenco, kiun mi trovis en la reto, estas lia filo Martin Petiška, ankaŭ konata fekunda verkisto. Sed longe mi ne povis trovi kontakton al li. Finfine mi malkovris almenaŭ la poŝtan adreson, kio igis min, post longa tempo, skribi kaj enpoŝtigi surpaperan leteron. En ĝi mi klarigis, ke temas pri traduko kaj eldono hobia, ne profitcela, kiu estos en la reto senpage uzebla. Pro tio mi nome de la kolektivo de la prilaborantoj petas senpagan kopirajton.

Post kelkaj tagoj sonoris mia telefono kaj en la dua ekstremo de la linio anoncîĝis Martin Petiška. Per tre afabla maniero li esprimis ĝojon, ke ekzistas plia lingva versio, eĉ en Esperanto, tamen li ne estas kopirajt-portanto, sed lia 92-jara panjo. Li jam parolis kun ŝi kaj ŝi pri la publikigo de la Esperanto-traduko konsentas. Mi petis lin komuniki tion al mi skribe, almenaŭ perrete, kion li faris kaj mi peris tion al la teknika prizorganto kaj enretiganto Vláďa Türk.

Mi ankoraŭ ne menciis la ĉefan „kulpulon“ de la projekto, la tradukinton, pli precize tradukintojn, ĉar temas pri duopo: Ili estas Dorotea kaj Hans-Georg Kaiser. Ili tradukis la mitojn origine el la germana, sed kune kun V. Türk ili komparis kaj plibonigis la tradukon laŭ la ĉeĥa originalo. Kaj mi citu Hans-Georgon: *Tial ĝi estas tiel proksima al la ĉeĥa originalo. Se ni estus tradukintaj ĝin nur laŭ la germana, la rezulto estus multe malpli bona*.

Mi aldonu, ke la libro jam aperis en Ĉeĥio dekkvinfoje kaj estis tradukita kaj eldonata en la slovaka, slovena, bulgara, germana, angla, itala, nederlanda, finna, rusa, hungara kaj estona lingvoj. En Francio ĝi aperis ĝis la jaro 2011 eĉ dudekkvinfoje, ĉar ĝi fariĝis tie lerneja legado. Esperanto do estas la 14a lingva versio de la sukcesa libro de Eduard Petiška.

Per ĉi tiu artikoleto mi volas publike danki kaj gratuli al la tuta kolektivo de la kunlaborantoj kaj ĉefe rekomendi tiun valoraĵon al ĉiuj interesiĝantoj. Jen la rekta ligilo: **1url.cz/Wt8xQ**

Petro Chrdle



EDUARD PETIŠKA

MALNOVAJ GREKAJ MITOJ

La libro aperis en Ĉeĥio dekkvinfoje kaj estis tradukita kaj eldonata en la slovaka, slovena, bulgara, germana, angla, itala, nederlanda, finna, rusa, hungara kaj estona lingvoj. En Francio ĝi aperis ĝis la jaro 2011 dudekkvinfoje kaj fariĝis lerneja legado.

Traduko: Dorothea kaj Hans Georg Kaiser
Kontrolo kaj teĥnika prilaboro: Vladimír Türk
Legas: Jarka Malá, Jan Fidel Řepa, Vladimír Türk
La sono ekfunkcias post klako al la nomo en la PDF-dosiero aŭ rekte el dosierujo „REGISTRAĴOJ-NAHRÁVKY“.

ENHAVO

© Eduard Petiška, 1958 (La unua eldono de la ĉeĥa originalo)
© Eduard Petiška, 2018 (La unua Esperanta eldono)
© Traduko Dorotea kaj Hans Georg Kaiser, 2018

EDUARD PETIŠKA

STARÉ ŘECKÉ BÁJE A POVĚSTI

Kniha vyšla v Česku patnáctkrát a byla přeložena a vydávána ve slovenštině, slovinštině, bulharštině, němčině, angličtině, italštině, nizozemštině, finštině, ruštině, maďarštině a estonštině. Ve Francii vyšla do roku 2011 dvacetpětkrát a stala se školní četbou.

Překlad: Dorothea a Hans Georg Kaiserovi
Kontrola a technické zpracování: Vladimír Türk
Čtou: Jarka Malá, Jan Fidel Řepa, Vladimír Türk
Zvuk se spustí kliknutím na název v PDF souboru nebo přímo z adresáře „REGISTRAĴOJ-NAHRÁVKY“.

OBSAH

© Eduard Petiška, 1958 (První české vydání)
© Eduard Petiška, 2018 (První esperantské vydání)
© Překlad Dorotea a Hans Georg Kaiserovi, 2018

# Eble respondeto al via artikolo „Al Esperanto mankas kleriga literaturo“ en Starto, 2018,1.


Ĉar mi samopinias multajn jarojn, mi ĉiam penis, per miaj modestaj fortoj, iom kontribui al la forigo de ĉi tiu manko de Esperanto. Nome kunlaborante kun diversaj fakaj revuoj kaj KAEST.

Krome, dum pluraj lastaj jaroj, mi estis laboranta super kelkaj vortaroj, kiujn mi alŝutis al TTT. Dum la lastaj jaroj mi plurajn el ili aktualigis.

Ĉi tie la informo pri ili por vi, dependas nur de vi, ĉu vi metos la sciigon pri ili ankaŭ en Starton:

Sistema ĥemia nomenklaturo en Esperanto: Konciza enkonduko.
**http://www.sistema-nomenklaturo-eo.mypage.cz**

Česko-esperantský a esperantsko-český slovník léčivých rostlin / Ĉeĥa-Esperanta kaj Esperanta-Ĉeĥa Vortaro de Medicinaj Vegetaloj.
**http://www.vortaro-med-veg-cs-eo.mypage.cz**





Konciza Imunoĥemia Vortaro Esperanta.
**http://www.imuno-vortaro-eo.mypage.cz**

Konciza Agroĥemia Vortaro Esperanta.
**http://www.vortaro-sterk-agro-eo.mypage.cz**

Konciza Ekoturisma Vortaro Esperanta.
**http://www.ekoturisma-vortaro-eo.mypage.cz**

Vortaro de la Ĥemia Metrologio Esperanta.
**http://www.labo-vortaro-metrologio-eo.mypage.cz**

Konciza Farmacia Vortaro Esperanta.
**http://www.farmacia-vortaro-eo.mypage.cz**




Kun sincera saluto

Zdeněk Pluhař

## Rimarkigo de la redaktoro:

Mi volus ankoraŭ aldoni, ke la homoj komunikas por interŝanĝi informojn kaj opiniojn, ne por propagandi, disvastigi kaj venkigi iun lingvon, nek por montri al fremduloj, kiel bela estas la parolata lingvo. Nia propagando estas malmulte efika, ĉar ĝi iras kontraŭ la naturo de komunikado.

Parolante vian gepatran lingvon vi certe ne celas ĝin disvastigi, nek allogi fremdulojn por lernado. Vi simple volas sciigi al viaj familianoj, kolegoj, amikoj iun novaĵon aŭ ricevi ilian opinion. Aŭ vi sekvas amaskomunikilojn aŭ studas lernolibrojn de diversaj fakoj por kleriĝi.

Kiam ni uzos Esperanton nature, ĝi disvastiĝos mem.

Miroslav Malovec

# La 34-a PSI en PLAUEN

La unuan fojon la Printempa Semajno Internacia okazis en la plej sudorienta parto de Germanio en la urbo *Plauen* de la 30-a de marto ĝis la 6-a de aprilo 2018. Ĝi situas proksime al la ĉeĥa landlimo. La urbo havas ĉirkaŭ 65 200 loĝantojn. Ĝi famiĝis kaj riĉiĝis pro punto-farado. Ĉi-jaran PSI organizis familioj Haumer, Buhr/Weil, Klünder kaj Sawitzki kun surloka helpo de aliaj esperantistoj. Al la aranĝo aliĝis 109 samideanoj el 10 landoj kaj preskaŭ ĉiuj alvenis. Ni loĝis en la centro de la urbo en speciala loko de iama fajrobrigadejo transformita en junularan gastejon. La interno de la konstruaĵo rememoris pri tio per diversaj ornamoj kaj surmuraj desegnaĵoj.



La programo kontentigis ĉies postulojn. Okazis programeroj por etuloj, infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj. La plej malgrandaj infanoj ĝuis Mazi-kurson kaj vespere piĵamajn rakontojn de Nicky Janssen, kiu ankaŭ dumtage okupis aliajn per manlaboroj. Krom diversaj desegnaĵoj, bestetoj, maskoj, ludiloj, saketoj kaj tortoj el teleroj, la infanoj fervore kontribuis al pretigado de vera torto farita el biskvitoj kaj bombonoj por du feliĉulinoj festantaj naskiĝdatrevenon. Kia ĝojo manĝi ĝin poste.



Gejunuloj ĝuis diversajn ludojn ekstere kaj interne de la konstruaĵo. Plaĉa por ili estis kaosludo, dancado laŭ indikitaj paŝoj helpe de komputilo, solvado de Rubik-kubo, ĵonglado, origamio kaj aliaj. Eblis ankaŭ ŝakludi per grandaj figuroj en la korto de la konstruaĵo. Multaj ŝatis glitadon sur fajro-stango instalita en la domo. Infanoj ĝuegis aktoradon en mallonga filmeto pri fajrobrigadistoj inventita kaj reĝisorita surloke de Christoph Frank kaj Ralf Haumer. Dum la semajno eblis ĉeesti E-kursojn de diversaj niveloj, lingvajn ludojn kaj interesajn kvizojn.

Plenkreskuloj ĝuis diversajn prelegojn, en kiuj oni akiris novajn sciojn pri sindefendo, pri amo, pri tajdo, pri komunumo Hermusando en Svedio kaj ĝia daŭripova evoluo, pri mondaj heredaĵoj de UNESCO en Ĉeĥio, pri la vivo kaj verkoj de la ĉeĥaj fratoj Ĉapek, pri divenaparato. Al aliaj interesaj programeroj apartenas la ŝatata ovo-serĉado, cirklodancado kaj fotokonkurso.

Pri la aranĝo interesiĝis ankaŭ ĵurnalistoj. Okazis intervjuoj kaj poste aperis artikolo en loka ĵurnalo. Kiel kutime dum la tuta aranĝo funkciis libroservo prizorgita de FEL (Flandra Esperanto-Ligo). Kelkaj interesuloj grupiĝis por kantado kaj muzikado. Matene eblis ekzerci ĉigongon pri kiu spertas Dieter Menke, antaŭtagmeze praktiki viglan zumbon kun Zoja Haumer kaj post la vespermanĝo malstreĉigan gimnastikon kun Anna Dupechaud. Di-kredantoj povis ĉeesti Matenan Laŭdon.



Post la tagmanĝo okazis ĉiutage ekskursoj kaj promenadoj. Eblis viziti infanan amuzparkon, drakan kavernon, hidroelektran stacion, muzeon pri brodaĵo, *Elster*-ponton, ban-komplekson *Agua Word*, urbogvidadon per speciala historia bierelektra tramo, aŭtomobil-muzeon en *Zwickau* kaj du aliajn lokajn muzeojn. Ni mem vizitis la urbojn Hof, Elsterberg, Greiz kaj ĉe la forveturo Waldsaasen.

Vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj. Koncertis por ni grupo Ĵele kaj Kaŝi. Christoph Frank transportis nin per magia vojaĝo tra la mondo al Italio, Ĉinio, Hindio, Ĉilio, Usono kaj prezentis kelkajn surprizajn magiaĵojn, kiujn ni tre ĝuis. Gaja etoso regis dum la paska fajro kun rostado de pastaĵo sur stango.



Originala estis vespera balo en fajro-brigadaj kostumoj pruntitaj surloke. Ankaŭ nokta promeno tra la urbo kun loka gvidanto plaĉis al ĉiuj, kiuj ĝin partoprenis. Malfrue vespere eblis spekti kinejajn filmojn kaj babili en trinkejo kun amikoj. Lasta adiaŭa vespero estis dediĉita al niaj talentuloj. Eksonis muzikado, kantoj, Danka Leyk organizis cirklodancon kun kandeloj, estis prezentita la filmeto "Fajro" pretigita surloke, Ralf Haumer prezentis kaj invitis la ĉeestantojn al la venonta PSI, kiu okazos en *Hochspeyer/Rejnland-Palatinato* (proksime al *Saarbrücken*) de la 15-a ĝis la 22-a de aprilo.

Ĉiuj estas bonvenaj al tiu agrabla renkontiĝo, kie oni festas Paskon kaj bonvenigas printempon! Per dankoj al la organizantoj kaj prelegantoj finiĝis la ĉi-jara PSI.

*Liba Gabalda*

*fotoj Liba kaj Floreal Gabalda*

# JUBILEOJ

Miroslav Boleslav, Miletín
Mgr. Jana Brancuzská, Mor. Budějovice
Ing. Libuše Dvořáková, Svitavy
Libuše Dvořáková, Mor. Budějovice
Anna Gybasová, Vidče
Ing. František Havlík, Hodonín
Ing. Jan Kalný, Čes. Budějovice
Ing. Ladislav Kovář, Česká Třebová
Karel Krejča, Praha
Václav Lamr, Praha
Jiří Mitáš, Buchlovice
Anna Mráčková, Šumperk
Marie Pichová, Držkrajov
Jiřina Plášková, Velké Losiny
Pavel Polnický, Poděbrady, HM
Ing. Lea Pražáková,Pardubice
Jiří Rada, Most
František Rakušan, Ostrava
Jiří Studený, Majetín
Štefan Takáč, Uničov
Vladimír Türk, Netolice
Jiří Vyšinka, Vracov
Danuše Zíková, Pelhřimov

## Josef Hron - 85



La 5-an de junio festas sian 85-jariĝon honora membro de ĈEA, **Josef Hron** el Pardubice, aktiva ankaŭ en AEH. Lia ĉefverko estas komputila Esperanta-Ĉeĥa vortaro, kiu enhavas pli ol 100 000 vortojn. Ĝi ne ekzistas libroforme, nur en programo Excel, sed ĝi havas avantaĝon, ke oni povas en ĝi facile serĉi laŭ ambaŭ direktoj. Nun tie aperis **nova 11-a versio**.

www.esperanto.wz.cz/

## Jan Duda – 80



La 25-an de junio atingas sian 80-jariĝon honora membro de ĈEA **Jan Duda** el Olomouc. Sian vivon li travivis kiel membro de Moravia Filharmonio Olomouc (1965-1996).

Ni esperantistoj konas lin kiel artiston, kiu per sia violonado riĉigas programon de niaj kongresoj, konferencoj kaj aliaj aranĝoj.

## 100-jariĝo


La 1-an de julio festas sian 100-jariĝon s-ro **František Janouš** el RUMBURK. Ni kore gratulas kaj deziras multe da bonhumoro, sano kaj aliaj por vivo necesaj aferoj!!!

## Miroslav Smyčka

La familio kaj EK Písek organizis por liaj Esperanto-geamikoj rememorrenkontiĝon, ligitan kun trarigardo de la tombejo Olšany kaj eta poezia kaj muzika programo ĉe lia tombo kaj en la restoracia saloneto. Video ĉe Youtube.



# Ján Vajs - 65



La 21-an de junio ĝisvivas 65 jarojn slovaka esperantisto Ján Vajs, kies ekspozicion ***Montpintoj de Eŭropo*** ni povis admiri en Urba Muzeo kaj Galerio de Svitavy en 2013.

Li devenas el regiono Liptov. Kiel fakulo apartenas al eminentuloj de la slovaka agrikulturo. Li laboris kiel zooteknikisto, ĉefinĝeniero kaj prezidanto de UAK (kooperativoj). Sur regionaj kaj ŝtataj niveloj li okupadis kelkajn gravajn postenojn, finante sian laboron en Ministerio de Termastrumado. Li ricevis dufoje medalon de slovaka ministro kaj unu de mongola ministrino de agrikulturo.


En E-movado li kunfondis kaj prezidis SKEF kaj la tutan vivon li funkcias en Liptova Esperanto-klubo. Kiel vicprezidanto de LKK li kunorganizis la 101-an UK en Nitro. Por dumviva laboro dediĉita al Esperanto, li estis honorigita per diplomo de UEA.

Kiel ĵurnalisto li redaktis kaj ĝis nun verkas artikolojn por Esperantisto Slovaka kaj aliaj periodaĵoj. J. Vajs estas verkisto, historiisto kaj tradukisto. Pri historio de E-movado en Slovakio li verkis du tre gravajn verkojn: ***Cent gravaj personoj*** kaj ***Kiu estas kiu en la slovaka***. Li esperantigis verkon de poetino M. Dobrovičová ***La knabino kun vizaĝo de la luno*** (S-E) kaj enslovakigis libron de T. Sekelj ***Temuĝin, la filo de la stepo*** (E-S), en kiuj li pruvis sian poezian talenton.

Pli ol 30 jarojn li iniciatas kaj organizas longtempajn vojaĝprojektojn. Li mem vizitis pli ol 84 landojn. Ekde 1983, li organizas renkontiĝon de vojaĝantoj sub la nomo Poludnica en Liptovský Ján.

Aliaj verkoj: ***Kongresa taglibro*** (UK Hanojo 2012), ***Ultima Thule*** (UK Rejkjaviko 2013), ***Esperanto na Liptove, Ŝafaĵoj, La dua decenio, Plena Ilustrita Ĉevalo, Subtatrano, Enkorpigita toleremo, 12 monatoj – 12 montpintoj, Slovakaj plejoj.***

*Teksto Mária Pilková)*




# Popradfila 2018

En la tagoj 27.4. – 6.5. 2018 okazis en Subtatra Muzeo de Poprad filatela ekspozicio de la 3-a grado, kiun sukcese partoprenis ankaŭ esperantistoj.

**Vladislav Hasala** akiris arĝentumitan medalon en la klaso Poŝtaj tutaĵoj pro kolekto *Esperanto sur tutaĵoj de Slovakio* (51 poentoj) kaj

**Peter Holba** ricevis arĝentumitan medalon en la klaso Tem-Filatelo pro kolekto *Birda vivo* (52 poentoj) kaj arĝentumitan medalon en Malfermita klaso pro kolekto *Internacia lingvo Esperanto* (56 poentoj).

**Rimarkigo:** Oni distingas inter arĝenta kaj arĝentumita medaloj.

# Vladimír Škoda
**(1953-2018)**

La 4-an de marto 2018 forpasis medicina doktoro **Vladimír Škoda** el Bučovice, (65-jara) post longa malsano. Inter la jaroj 1979-1990 li estis membro de Centra Komitato de ĈEA, laboris en estraroj de junulara kaj pedagogia sekcioj.





**Rememore al doktoro Vláďa Škoda**. Kiam mi ĉi jare januare pere de Starto gratulis al doktoro Vladimír Škoda por lia 65-jariĝo, mi tute ne imagis, ke komence de marto li forlasos nin. Ni bone konis unu la alian de nia junaĝo (de Somera Esperanto-Tendaro en Lančov).

Ni estis vere proksimaj geamikoj. Li estis ĉiam serioza, pensema juna homo, eminenta studento eĉ en altlernejo. Li interesiĝis pri sia medicina fako, kompreneble, pri scienco, filatelio, literaturo, politiko kaj aliaj fakoj. Siatempe li estis eĉ deputito en Parlamento de Ĉeĥa respubliko. Esperanto estis lia hobio.

Niaj vivoj disiris, sed ni sciis unu pri la alia. En lastaj jaroj li estis malsana, sed li ĉiam respondece plenumis sian kuracistan vivodevon, poste li estis grave malsana. Finfine li troviĝis en malsanulejo pro vundita genuo … kaj en la malsanulejo, kiu eble estis lia sorto, li ankaŭ restis. Li foriris sen adiaŭo, dum dormo.

Leonka Chaloupková


# Vladimíra Vychodilová

La 25-an de marto forpasis **Vladimíra Vychodilová** (73-jara), fraŭline Škarková, el E-klubo Ostrava-Vítkovice.





# Pavel Sittauer
**(1934-2018)**

La 31-an de marto 2018 mortis honora membro de ĈEA **Pavel Sittauer** el Třebíč (84-jara). Li estas konata precipe kiel organizanto de **Someraj Esperanto-Tendaro**j, unue en Chvalatice, poste en Lančov dum pli ol 65 jaroj. Kiel aktiva skolto li pasintjare ricevis honorigon de Třebíč pro sia skolta kaj esperantista agado. Kompreneble li estis multjara prezidanto de EK Třebíč.

Iniciate de li postlasis la klubo ankaŭ vicon da libroj: **ABC de Esperanto, La mondo rakontas, 808 nejpoužívanějších slov** (Kilian), **Historio kaj Literaturo** (Vondroušek), **Gramatiko de Esperanto** (Malovec), **Konstruado en altoj** (Březina), **Ondro kaj drako** (Dyk), **El mia vivo** (Nezval), **La knaboj de Kastora Rivero** (Foglar).



La 8-an de majo 2018 forpasis s-ino **Olga Vlačihová-Bohunová** (72-jara) el Horní Nová Ves.

# REĜA ORDENO POR ROB MOERBEEK

**Rob Moerbeek**, honora membro de UEA, ricevis nederlandan reĝan **Ordenon de Oranje-Nassau**. La urbestro de la urbo, en kiu Rob Moerbeek loĝas, Beverwijk, speciale venis al Roterdamo por enmanigi la ordenon kaj gratuli la samurbanon dum la Malferma Tago de UEA, la 28-an de aprilo 2018

(vidu videon: https://www.youtube.com/watch?v=2viNCD2snwg).

Rob Moerbeek fariĝis kavaliro de la ordeno pro siaj grandegaj meritoj por la Esperanto-movado en Nederlando kaj tutmonde, kaj ankaŭ pro sia daŭra sindediĉa agado favore al handikapitoj, precipe blinduloj kaj malfortevidantoj.

Gazetaraj komunikoj de UEA

# Israela kongreso

Sabate la 5-an de majo 2018 finiĝis la tri-taga Israela Kongreso en Akko. Partoprenis pli ol 30 personoj. Oni ekskursis al Haifa (Bahaa Centro kaj japana muzeo Tikotin) kaj al Akko (ĉefe la kruckavaliraj fortikaĵoj).

Ĵaŭde kaj vendrede okazis distraj vesperoj kun koncertoj de Ĵomart kaj Nataŝa, de Edgar (Sepa), kaj lokaj kontribuoj de Enrica, Tali kaj Mikaelo.

La kleriga posttagmeza programo havis kontribuojn de Tali, Jehoshua, Mikaelo, Gila kaj Luiza. La plena programo kaj fotoj troviĝas en http://esperanto.org.il/ik.html.

La partoprenantoj ricevis la novan n-ron de Israela E-isto, kiu estos poŝte sendota al la ceteraj membroj kaj abonantoj. Sekvis la 7-taga postkongresa ekskurso al Jerusalem, Morta Maro, Eilat kaj Jordanio.



Amri Wandel
Prezidanto de ELI

# Nova klubejo en Mladá Boleslav

La Rondeto de Dr. Hradil havigis al si klubejon. Ni kunvenos ĉiun merkredon de la 10-a horo. Ĉiu estas invitata!

**Adreso:** Mezigenerační centrum, Zahrada Klementinka - Třída Václava Klementa 601, Mladá Boleslav.

Jindřiška Drahotová
drahotovaesperanto@seznam.cz

*

# Esperantistoj alveturis kolektiĝi en Zderaz

**27. – 29. 4. 2018**

Ripoz-centron Renospond en Zderaz en la Chrudim-regiono elektis la esperantistoj el Svitavy kiel ekskursan sidejon de sia aranĝo. Sume alveturis 17 partoprenantoj el 5 lokoj de la respubliko.

Inter la partoprenantoj estis ankaŭ Ksenija Pavlova el Ukrainio kaj Li Huang el Ĉinio.



Ekde la komenco regis bona humoro. La plej gaja estis la vendreda interkonatiĝa vespero. Sian farton kelkaj plibonigis per proceduroj en la bonfarta centro (wellness-centro) aŭ per nokta naĝado en subĉiela naĝejo.



Sabate antaŭ tagmeze ni vizitis Muzeon de Pipoj kaj savo-stacion Pasíčka, ambaŭ en Proseč, kaj kirkon de Dia amo en Budislav. La kirko en formo de koro sur roko konstruigita fare de loka naskiĝinto Jaroslav Vomáčka, estis konsekrita en 2004. Ekde tiu tempo ĝi servas al la komunumo kiel preĝejo, solenejo kaj koncertejo.

Posttagmeze ni ekpromenis al la rokoj, konkrete al la t. n. Ĉevalejo de Toulovec (Toulovcovy maštale) kaj Urba ĉevalejo (Městské maštale) – ĉiu laŭ siaj kapabloj kaj fortoj.



Dimanĉe ni vizitis la kastelon  Nové Hrady, kie estas ankaŭ bela itala ĝardeno, legoma ĝardeno, ĉevalejo, cervejo, muzeo de bicikloj kaj labirinto. Feliĉe ĉie estas belvidejoj, alie oni povus facile perdi la vojon kaj serĉi ĝin dum la tuta tago. Ne senkaŭze estas malpermesita eniro al infanoj sen la gepatroj.  En Nové Hrady estas nova Fabeldomo, vere vizitinda.

Ni uzis belan kaj refreŝigan semajnfinon plenan de suno kaj de belaj travivaĵoj.

*Libuše Dvořáková*

*fotoj:*
*1. antaŭ Renospond*
*2. en la kirko de Dia amo*
*3. en Fabeldomo*

**Periodikum Českého esperantského svazu, z.s.**
**49. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**starto@esperanto.cz**
**http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, vratislav.hirs@esperanto.cz, tel. 517 444 117**

**Uzávěrka příštího čísla**: 15.8.2018

---------------------------------------------

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**
**49-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster Eŭropo 13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**elektronika versio PDF 6 eŭroj**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**

**Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, starto@esperanto.cz**

**http://www.esperanto.cz/starto**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero**: 15.8.2018

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

# KALENDARO

**2018-07-08** Solenaĵo omaĝe al F.V. Lorenc en Čáslav kaj Vrdy
Info: pavla.dvorakova@esperanto.cz
**2018-07-15/28** 2-a etapo Lančov
**2018-07-29/08-10** 3-a etapo Lančov
**2018-08-04/06** 85 jaroj de Esperanto en Svitavy
Info: dvor.libuse@seznam.cz
**2018-08-06/09** 5-a Lernejo Bartošovice
Info: https://lernejo.weebly.com
**2018-08-10/12** Renkontiĝo de eksaj tendaranoj en Lančov, Info: http://set-lancov.cz/
**2018-08-06/13** La 22-a Ekumena kongreso en Poděbrady, Info: polnickypavel@seznam.cz
**2018-09-14/16** Dek jaroj de Esperanto-Muzeo en Svitavy, Info: cea@esperanto.cz, Kalendaro de aranĝoj en Esperanto.cz
**2018-10-12/14** Konferenco de ĈEA en Benešov
Info: leonarda.ch@seznam.cz
**2018-12-01** Antaŭkristnaska Renkontiĝo en Písek (ANKRO), Info: pisek@esperanto.cz
**2018-12-09** Marcipana Kristnasko en Svitavy
Info: svitavy@esperanto.cz
**2018-12-29** Silvestro en Česká Třebová
Info: jk.esperanto@seznam.cz

## Eksterlande

**2018-07-14/22** Somera Esperanto-Studado en Liptovský Mikuláš (Slovakio)
Info: http://ses.ikso.net/2018/
**2018-07-21/27** OSIEK-Konferenco en Kastelo Greziljono (Francio)
Info: kastelo@gresillon.org
**2018-07-28/-08-04** UK Lisbono
https://uea.org/kongresoj/UK/2018
**2018-08-05/12** SAT-Kongreso en Kragujevac (Serbio)
Info: financoj@satesperanto.org
**2018-09-20/23** ARKONES (Artaj Konfrontoj en Esperanto) en Poznan (Pollando)
Info: www.arkones.org
**2018-09-20/23** Montkabana Renkontiĝo (MKR) en Erjavčeva koča (Slovenio)
Info: vanja.radovanovic@ericsson.com
**2018-10-18/21** KAEST en Modra (SK)
http://kaest2018.ikso.net/
**PLI DA INFORMOJ ĈE**
http://www.esperanto.cz/eo/akce
www.eventoj.hu/kalendaro.htm



Esperantistoj kaj familianoj kolektiĝintaj ĉe la tombo de Miroslav Smyčka por rememori la unuan datrevenon de lia forpaso.



Esperanta opero Sternenhoch



Paroliga kurso en Skokovy




E-mental dum la bonfara projekto BRIKO en Prago



En la rokaro de Toulovec

*foto: Hana Smejkalová*



*foto Pavel Dvořák*

Muzea nokto en Svitavy